


# PONTO☆

*Jaro 5 N-ro 2 (27) Organo de Sunda Esperanto Agado aprilo 2006*

## **Lars Forsman**, Karlskoga folkhögskola

# *Esperanto – Språket och idén*

Malmö stadsbibliotek
25/4 kl 18.30-20

Allmänheten inbjudes till information och provlektion om esperanto.

**Föredraget sker på Malmö Stadsbibliotek i Gullbergsrummet tisdagen den 25 aprilŭ kl. 18.30-20.00**

Folkhögskolelärare Lars Forsman, mångårig internationell esperantolärare, informerar om esperanto och ger en kort provlektion. Möjlighet ges att fråga och reagera!

Umeå Universitet startade esperantostudier för ett 70-tal elever, där man använder den nya läroboken i esperanto för gymnasiet författad av bl.a. Lars Forsman.

**En unik chans att få en kompetent information om esperanto. Informera dina vänner och bekanta om föredraget!**




## Raporto pri la kongresaj laboroj

La preparaj laboroj pri la kongreso kontentige progresas.
Aktuale ni okupas nin pri la informado pri la kongreso. Bonegan kunlaboron ni havas kun Malmö Turism, kies reprezentanto Karin Björnsson ĉiel helpas nin. Ŝi ne nur konsilas al ni kiujn kontaktojn preni, sed ankaŭ pere de la informaj kanaloj de Malmö Stad sciigos la amaskomunikilojn pri la kongreso.
Rigardu **www.malmo.se**!
Bonan kontakton ni kreis ankaŭ kun ”Spegeln” senkosta gazeto, kiu montris grandan intereson pri nia afero kaj publikigis favoran artikolon en la Malmöa eldono kaj planas aperigi la saman artikolon en tri alilokaj eldonoj.

Ĝis la 31.3 aliĝis pli ol 80 partoprenantoj.

Sten Svenonius

**Saluto al nia kongreso**
Saluton, ni kun ĝojo eksciis, ke estos en majo 100 jara Jubileo de Via asocio, ni estas esperanta ensemblo Asorti, ludis ĉi-jare dum UK, kaj intencas vojaĝi por elpaŝi en Germana 100jara Jubileo.

Grandaj salutoj por Via festo, deziras sukceson prepari kaj gvidi la aranĝon!
Ni bone memoras nian partoprenadon dum Sveda Kongreso 2000 en Helsinborgo.
Sinceraj salutoj al svedaj amikoj, litova grupo Asorti. mailto:asorti@sugardas.lt

Nästa **Ponto**, nr 3
utkommer ca 2/9
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
**senast den 19.8**

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado)



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 77 N-ro 2 (696)* **>>ĉiam antaŭen<<**

Fondita en 1906


**Tagordo 26.4**
1. Elekto de protokolkontrolanto
2. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj kursoj
3. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj programeroj
4. Eventualaj demandoj

## Jarkunsido de KEM 15.3

La prezidanto Sten Svenonius bonvensalutis la ĉeestantojn kaj malfermis la kunsidon. La mortintajn membrojn Britt Hernsell kaj Brita Sjöblom la kunsido honoris per silenta minuto.

Post la laŭstatutaj decidoj sekvis elektoj jene:
**Prezidanto** por unu jaro Sten Svenonius
**Estraranoj** por du jaroj Per-Olov Johansson kaj Karin Rylander. Anstataŭanto Anders Rylander
**Revizoroj** por unu jaro Evert Rausek kaj Ulla Ullfors. Anstataŭantoj Agneta Lund kaj Asta Schaedel
**Studgvidanto** Sten Svenonius
**Informa komitato**
Per-Olov Johansson (sekretario), Agneta Lund, Alf Mobark kaj Albert Vel
**Programkomitato**
Gerd Rodén (sekretario), Gertrud Lund kaj Asta Schaedel
**Ponto** redakta komitato
Karin Lindquist (redaktoro) kaj Sten Svenonius, teknikaj aferoj Per-Olov Johansson, Ulla Ullfors kaj Albert Vel
**Biblioteko kaj arkivo** Åke Palm
**Bild- kaj fotoaferoj**
Alf Mobark kaj Per-Olov Johansson
**Komputilaj aferoj** Johan Svenonius
**Gazeteltondantoj**
Skånska Dagbladet Albert Vel
Sydsvenska Dagbladet Karin Rylander
Ystads Allehanda Ulla Ullfors
**Kolektanto** kaj gluanto de eltondaĵoj
Per-Olov Johansson
**Prizorganto de la klubejo** Evert Rausek
**Elektoprepara komitato**
Per-Olov Johansson (kunvokanto) kaj Ulla Ullfors

La estraro elektos delegiton ĉe la jarkunsidoj de SEF kaj Eldona Societo

**Kafkomitatoj**
18.1 Karin Lindquist
1.2 Per-Olov Johansson
15.2 Per-Olov Johansson
1.3 Gertrud Lund
5.3 Karin Rylander
29.3 Elsy Lindblom Vel kaj Albert Vel
12.4 Asta Schaedel
26.4 Per-Olov Johansson

La prezidanto informis ke la ”Historio de Klubo Esperantista de Malmö 1906-2006” estas presota kaj donacota al ĉiuj membroj.

La estraro decidis regali ĉiujn membrojn, kiuj pagis la kotizon por 2006, per la festmanĝo la 26-an de majo sen postuli partoprenon en la kongreso. Kelkaj informoj estis donitaj pri la kongresoj 25-28/5 en Malmö kaj la postkongreso en Kopenhago.

Lars Forsman prelegos en la Urba Biblioteko 25.4 kaj en iu lernejo 26.4.

Gertrud Lund

La venonta Ponto aperos nur komence de septembro. Tial ni jam nun vokas al la kunsido 6.9

**Tagordo 6.9**
1. Elekto de protokolkontrolanto
2. Informo pri la aŭtunaj kursoj
3. Informo pri la aŭtunaj programeroj
4. Elekto de komitatoj por la aŭtuna festo kaj la aŭkcio
5. Eventualaj kromaj elektoj
6. Decido pri la jarkotizo por 2007
7. Decido pri la abonkotizo por Ponto 2007
8. Eventualaj demandoj


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


**Legu pli pri Malmö sur paĝo 7**

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
***Kopenhago***
**N-ro 2 (666)  2006 70a-jaro**





**Nia estraro aspektas jene:**
**Prezidanto**
Kim J. Henriksen
Hallandsgade 6, 4.
2300 København S
tel 3254 9354
kekX@Yesperanto.dk
**Vicprezidanto**
Jytte Sunekær
Højlundshusene 16
3500 Værløse
tel 4448 4726
Jytte.sunekaerX@Ymail.tele.dk
**Kasisto**
Zita Garbaravicienė
Ny Kongensgade 18, 2. th.1557
København V
tel 3333 9030
blaustX@Ymobilixnet.dk
**Sekretario**
Nina Tofte Hansen
Nørre Allé 75, vær. 209
2100 København Ø
tel 8232 0209
ninath83X@Yhotmail.com
**Membro**
Ole Blaust
Ny Kongensgade 18, 2. th.


## Forpasis Poul Thorsen

Poul Thorsen (1915-2006) forpasis la 30-an de januaro - nia granda dana poeto.

En *Dana Fervojisto* n-ro 2, en *Esperanto en Danio* n-ro 1 kaj en *Revuo Esperanto* n-ro 3 estas nekrologoj.
En *Literatura Foiro,* decembro 2005, Carlo Minnaja aperigis artikolon: 1955: literaturaj revuoj norde kaj sude.
Estas interesa historio enhavanta inter alie pri *Norda Prismo*, unu el la ŝatokupoj de Poul. Laŭ lia edzino, Roma, la bela raporto atingis lin. - La klub-vespera temo la 1an de majo estos omaĝe al Poul Thorsen.



Vi povas legi pri nia ĝeneralkunveno, ke malavaraĝe aŭdiĝis la plendoj kontraŭ Kim. Pri la malzorgemeco mi kunrespondecas.- Kelkaj el niaj membroj volis, ke la klubo tuj ĉesu pagi bibliotek-luon. La estraro ne intencis dividi la librostokon disen al diversaj klubanoj. Tion ni ne sukcesis komprenigi la multajn ĉeestantojn, el kiuj kelkaj fuĝis. Pro nesufiĉa preparo ni lasis la alian survangon. – Nun la ordinaraj libroj troviĝas ĉe Betty Chatterjee en Vallensbæk, kaj la revukolektaĵoj estas ĉe Jytte en Værløse. La plej belaspektaj libroj jam estas en RUC. Ni eĉ havas la ambician revon enretigi la librojn, ĉar Jens S. Larsen ofertas aranĝi tion laŭ nia kartoteko.
*/Jytte Sunekær*

## Kursoj:

Kurso por komencantoj, kurso por daŭrigantoj kaj legogrupo daŭrigas siajn laborojn provizore kun la *instruantoj* Regin Larsen, Zita Garbaravicienė, Kim J. Henriksen kaj *gvidanto de legogrupo* Arne Casper.

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el jenaj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Zita Garbaravicienė (KEK).

## Programo por KEK/DEFA Kopenhago,

Vasbygade 10, DK - 2450 København SV - ĝis 5/6-2006

Kunvenoj okazas ĉiujn labortagajn lundojn.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krad)pordo.
NB NB NB Retadreso
Ne plu ekzistas la ebleco de interreta aliro en nia klubejo, sed per komputilo ni povas prezenti esperanto-kurson kaj aliajn enmetitajn/enmetotajn erojn.

**Daŭre ni havas la retadreson**
***defakek@hotmail.com***
**kiun ni malfermas antaŭ ol iri al la kunvenoj.**

La unuan lundon de la monatoj ni kune vespermanĝas je h 18.30 –
kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel 36 46 62 79.

**Kutimaj horoj:**
Kursoj: 18.45 – 19.30 + 20.00 – 20.45
Legogrupo: 19.00 – 19.30 + 20.00 – 20.45
Kafo/teo-trinkado 19.30 – 20.00
Programoj 20.00 – 20.45 + 21.00 – 21.45

# Raporto de SEA-kunsido en Kopenhago sabate la 11.3 2006

## SEA-protokolo

**La 10-a SEA-kunveno okazis la 11.03.2006 en Kopenhago.**
Ĉeestis: Karin Lindquist, Sten Svenonius, Per-Olov Johansson el Malmö. - Ann-Louise Åkerlund el Helsingborg. - Jytte Sunekær, Kim J. Henriksen, Zita Garbaravicienė kaj Ole Blaust, Kopenhago.

**1. Elektoj**
Gvidanto: Kim, protokolanto: Jytte.

**2. La 100-jara jubileo de KEM kaj SEF en Malmö**
Jytte ricevis ekzempleron de la nova svedlingva revueto *Språket Esperanto* (redaktejo en Väsby) por skribi pri la kunlaboro ĉirkaŭ la Sundo. - Banderolon, kiun Kim dum jaroj uzis: ni serĉu en la ”biblioteko”! Sten rekomendis nin viziti www.agado.net . www.malmo.se enhavas turismajn informojn en Esperanto. Dumkongrese ĉambro estas rezervita por senpaga tranoktado de la junuloj. Sten petis, ke Kim loĝu tie, kaj li akceptis. Sten invitis Kim rigardi la lokojn. - Kiuj junuloj venos el Danio: Ileana kaj Kim esploros. – Partopreno en la dana ĝeneralkunveno ĉiam estis senpaga por la membroj. – Ni memoru pri eventuala kontakto kun Kalle Kniivilä. – Jubilea kajero de KEM aperos. – Provleciono je unu horo estos ofertita al la publiko dum la interkona vespero (en apuda ĉambro) de Zita Garbaravicienė.
*Cetere 2006 estas la multkultura jaro* en Svedio. Artikolo *”Världsspråket utan land”* aperis en senpaga semajna gazeto Lokaltidningen en Helsingborg.

**3. Raporto (hejmpaĝo, kursoj, aranĝoj)**
Ni deziras ligilon al www.agado.net en la DEA-retpaĝo. Ek de nun ni klubanoj mem enskribas niajn aranĝojn en la programtabulo.
En Kopenhago, post la informkampanjo diversmaniera, ĉiulunde funkcias kun pli ol 20 vizitantoj: komencanta kurso kun junaj lernantoj, daŭriganta kurso, legogrupo, studgrupa/programa kunveno. Okazis la Kulturnokto kaj librofoiro. Ni havis vizian tagon, estis proponitaj multaj ideoj. - Socia forumo, granda publika aranĝo, DEA partoprenis. Gast-instruisto mendita ĉe ILEI gvidis komencantojn, daŭrigantojn kaj seminarion por instruistoj dum plenŝtopita semajno (DEA-aranĝo). Ĉiusemajne ni per agadolisto sendas informon pri la kluba programo. Kim disvastigas informojn pere de esperanto.dk. Aliajn informojn li ĉiumonate sendas al 150 adresoj.
Jen plendo: www.agado.net havas ligilon al la kopenhagaj kluboj. Daŭre estas malĝusta retadreso al Lene Niemann, DEFA. Laŭ Johan temas pri ligilo neredaktebla por li, kaj Jytte kontaktos Torben.
Lige al la *75-jara jubileo en Lund*, ni vizitis la katedralon kun ĉiĉerono Andreo Laskowski. Kroniko pri LEK prezentiĝis svede kaj esperante.
Helsingborganoj renkontiĝos en la urba biblioteko. Ann-Louise vizitis www.ikso.net kun multaj ligiloj. Kelkaj el ili ne funkcias. – Ili kunjubileis en Lund kaj kristnaskfestis en Kopenhago.
Malmö laboras por la 100-jara jubileo. Estis informite, ke en Lesjöfors esperantistoj kunvenis por aranĝi informcentron, kiu kolektos kaj tradukos novaĵojn el Esperantujo al svedaj amaskomunikiloj.

**4. Ponto**
Ni estas kontentaj pri la pdf-versio por la presado, kiu faciligas la kopiadon. Kelkaj tamen ne povas legi la lastan eldonon per sia komputilo.


**5. Laborplanoj**
Bertil Nilsson prelegos 13/5 en biblioteko en Helsingborg, Lund planis iri tien por pikniki.
25/4 Lars Forsman prelegos en la ĉefa biblioteko en Malmö. 26/4 li ankaŭ prelegos en iu gimnazio. – 11/6 kulturtago en Heden (sportejo en Helsingborg). - 16/9 ekskurso en Helsingborg, en urboparto Planteringen - 23/9 lingvotago en Kopenhago.

**6. Kursoj**
Ĉar en Malmö mankas instruistoj Zita ofertas (krom la provleciono jarkunvena) doni 40-horan instruadon: 5 semajnfinoj 2x4-horaj. La semajnfinon 16-17an de septembro ĝi komencos kaj finos 14-15an de oktobro. La prezo estos 300 SEK.

**7. Ekstera informado**
La retpaĝaro de Malmö. Broŝuroj, vidu 2. Elsendolistoj, vidu 3. La prelegoj de Bertil Nilsson kaj Lars Forsman. Lingvotago 23.9 . Tago de asocioj. - Banderolafiŝojn ni trovu.

**Kroma kunveno** okazis post la oficiala kunveno inter la malmöanoj kaj Ileana en ties hejmo.

**Venonta SEA-kunveno okazos la 21-an de oktobro je 11-a horo en Helsingborg.**



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

Saluton

Jam la dua numero de Ponto en 2006! Kiam vi legas ĝin espereble la printempo alvenis. Sed mi foriris – al Tajlando por unu monato. Mi esperas renkonti esperantistojn en la urbo Nakhon Ratchasima-Korat nordoriente de Bangkok. Raporto venos poste.

La 18.2 nia klubo havis sian 72an jarkunsidon. Ĉiuj estraranoj estis reelektitaj: Ann-Louise, Peter, Barbro, Jill kaj Helga. Ne eblas trovi anstataŭantojn. Ni decidis altigi la membrokotizon por 2007 al 300 kr (hodiaŭ 255 kr), por familio 400 kr. Tio inkludas membrecon en SEF kaj la gazeton Ponto. Niaj klubkunvenoj okazos en la urba biblioteko "Café Birger" je la 13.30a horo dum la sabatoj 22/4, 20/5, 19/8, 21/10 kaj 18/11. La 16/9 ni invitos al promenado en la urboparto Planteringen kun gvidado en esperanto.

La 24.2 ĵurnalisto de Lokaltidningen intervjuis min. Ni renkontiĝis en la domo de Verdandi, kie ni havas nian kolekton da libroj kaj gazetoj. Ŝi faris inter alie la kutimajn demandojn pri kiom da esperantoparolantoj estas kaj kie ili troviĝas. Mi multe babilis kaj rakontis, transdonis informmaterialon kaj montris nian librejon. Estis surprizo por ŝi aŭdi, kiom vasta kaj multfazeta nia Esperantujo estas. La artikolo aperis la 8.3.

Lunde la 27.2 mi iris al Malmö por partopreni la studgrupon de Kjell Persson. Ni havis interesajn diskutojn, ne nur pri literaturo. La postan sabaton, 4.3 okazis en Lund interesa afero, vidu sube la raporton de la Lundanoj.

Amiko de mia edzo kaj mi ĉiun lundon havas unu-horan programon en la loka radio. Li petis min veni kaj paroli pri esperanto la 13.3. Mi kunportis kelkajn diskojn, li starigis kelkajn demandojn kaj ni iom diskutis pri diversaj temoj rilate al esperanto. La horo rapide pasis. En majo mi parolos pri esperanto en du kluboj kun internacia membraro.

Kiel vi vidas, io okazas. Eble ni lige al la prelego de Bertil Nilsson, la kongreso en Malmö kaj la kultura tago en Heden sukcesos altiri iom da intereso kaj povos aranĝi kurson dum la aŭtuno.

Ĝis revido! Ann-Louise

## La Esperanto klubo de Lund

### Karaj LEK-anoj!

Mallonge pri: kunveno, la 16/2 gvidita de Allan – la ĉeestantoj okupiĝis pri legado de gazetartikoloj el Montendre. Dum la jarkunveno, la 16/3, okazis la jenaj reelektoj: Prezidanto por unu jaro Anna-Maria Lange, bibliotekisto por du jaroj Ulla Säther, anstataŭantoj por unu jaro Allan Ljungstedt kaj Stig Wingårdh, revizoroj B. Chiru kaj Harry Engkvist, rev. anstataŭanto Ingrid Malteson por unu jaro. Elektita reprezentanto por la SEF-kongreso: Anna Maria Lange.

Ni legis salutkarton de Daniel kaj Anna Maria prezentis resumon pri okazintaĵoj en Tanzanio.

La 4.3 Ebbe Vilborg vizitis Lund kaj Ekska Huset por ricevi la Mentor-premion. Motivigo: li "aktive laboris laŭ la spirito de Mentoro" (Gunnar Holmstedt) eldoninte sveda- latinan vortaron kaj "Latinaj citaĵoj" (laŭ SDS), 16/3, sub MOMENTON. Ĉeestis esperantaj geamikoj el Helsingborg, Malmö kaj Lund.

Ankaŭ ĉi-jare legeblas Literatura Foiro en la urba biblioteko kaj ekde nun ankaŭ La Espero.

Vi estas bonvenaj al Ekska Huset sabate, la 6.5 je la 13-a h. Temo: La delegita reto de UEA – kio ĝi estas – kontaktoj dum vojaĝoj, interŝanĝo de informoj kaj "Kiel la verkisto Björn Larsson aperis "ĉirilate".
Pri la ekskurseto, la 13.5 al Helsingborg ni interkonsentu pri komuna vojaĝo.

Belan printempon – Ĝi eble ankaŭ ĉi-jare venos.

Anna-Maria Lange



Ebbe Vilborg

Je75-jara jubileo la gastoj el Malmö kaj Helsingb

| Kiam/När? | Kie/Var? | Kio/Vad? |
|---|---|---|
| 2006-04-03 | KEK/DEFA Kopenhago | Birthe Lapenna rakontos: La esperanto-vivo en Danio ĉirkaŭ la jaro 1962, kiam okazis la UK en Kopenhago |
| 2006-04-04 | KEKG, Kopenhago | "Poŝtmarkoj rakontas" Reĝo Harald decidas kristaniĝi post t.n. Dio-juĝo. Zeŭo ĵetas Kalistoan kaj Arkason ĉielen. Toro rajdas en la aero kaj decidas pri fulmo kaj tondro, pri ŝtormo kaj pluvo, pri la vetero kaj la rikoltaĵo. Al la rerakontado de tiuj historioj - kaj multaj aliaj - Mogens Rude Andersen trovis dum sia 50-jara Esperanta korespondado inspiron de diversaj poŝtmarkoj danaj kaj eksterlandaj. |
| 2006-04-10 19:30 h | KEK/DEFA Kopenhago, | Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi |
| 2006-04-12 | KEM, Malmö | Anna-Maria Lange denove gvidos ekskurseton en la gramatikon: de transitivaj verboj al akusativo |
| 2006-04-20 | LEK, Lund | Kiel mi utiligas la reton rilate esperanton. (U. Kwasniewska, A. Ljungstedt) |
| 2006-04-22, 13.30 h | KEH, Helsingborg | Kunveno. Ni renkontiĝos ĉirkaŭ kafeja tablo en Cafe´ Birger en la urba biblioteko. |
| 2006-04-24 19:30h | KEK/DEFA Kopenhago, Vasbygade 10 | Hvad vil vi med Esperanto? Kion ni volas kun Esperanto\" Kim enkondukos al diskuto pri niaj celoj, deziroj, vizioj ... |
| 2006-04-26 18.30h | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo paĝo 2.Poste: Demandoj pri la jubileo |
| 2006-05- 25-28 | KEM, Malmö | 100-jara jubileo de KEM kaj SEF<br><br>Jarkongresoj de SEF kaj DEA |
| 2006-05-01 18:30 h | KEK/DEFA Kopenhago, Vasbygade 10 | Omaĝe al Poul Thorsen ...Ni kunmetos bukedon de tekstoj kaj kantoj kaj rakontoj pri \'nia granda poeto\', kiu mortis en januaro. Se vi pretas kontribui, kontaktu la kunordiganton Lene Niemann. |
| 2006-05-08 19:30 horo | KEK/DEFA Kopenhago, Vasbygade 10 | Henning parolos pri PRONONCO en Esperanto ... Estos sendube lerniga vespero. Antaŭ la someraj kongresvojaĝ oj, plibonigu vian prononcon, tiel ke la eksterlandaj (kaj danaj) amikoj pli bone komprenu vin! |

Daŭrigo de paĝo 6

| | | |
|---|---|---|
| 2006-05-13 | LEK, Lund | Pikniko en Helsingborg |
| 2006-05-13 13.30h | Hörsalen, Stadsbiblioteket, Helsingborg | Prelego en la sveda de Bertil Nilsson sub titolo: "Esperanto - vad var tanken, och vad blev det?" Senpaga eniro, ĉiuj estos bonvenaj. Helsingborgs Esperantoförening KEH |
| 2006-05-15 19:30 | KEK/DEFA Kopenhago, Vasbygade 10 | Kim ludigos nin per diversaj ludoj. Ciuj aktiviĝos kaj ludas ludojn en kaj per esperanto. |
| 2006-05-20 | KEH, Helsingborg | Kunveno. Ni renkontiĝos ĉirkaŭ kafeja tablo en Cafe´Birger en la urba biblioteko. La tempo 13.30 h. |
| 2006-05-22 19:30h | KEK/DEFA Kopenhago, Vasbygade 10 | David-Emil Wickstroem estas etnomuzikscientisto nuntempe esplorante pri rusa populara muziko kiel doktora studento ĉe la universitato de Kopenhago. Li esperantiĝis antaŭ 10 jaroj kaj aktivis -as ene de gej, jefo, nje kaj nuntempe en tejo. Li prelegos pri TEJO kaj sia e-o agado. |
| 2006-05-29 19:30 h | KEK/DEFA Kopenhago, Vasbygade 10 | Danoj, kiuj partoprenis la 58an IFEF-kongreson en Shanghai kaj la DEA-jarkunvenon en Malmö, rakontos. |
| 2006-09-03 10.00h | KEM, Malmö | Aŭtuna festo en Beijers Park arangôta de la urboparto. Nia klubo informos |
| 2006-09-06 18.30h | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo paĝo 2. Poste: Kiel ni povos uzi la jubilean festadon en la informa laboro? |
| 2006-09-20 18.30h | KEM, Malmö | Membroj rakontos pri siaj someraj travivaĵoj |
| 2006-10-04 18.30h | KEM, Malmö | Raporto pri la UEA-kongreso en Florenco |
| 2006-10-14 16.00h | KEM, Malmö | Aŭtuna festo |

**Rigardu www.agado.net por pli da programoj!**

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en
.Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32 54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport,salono n-ro 1, dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ . 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk

*Hejmpago de SEA*
*www.agado.net*

**Daŭrigo de paĝo 2**
**Malmö**

**El la kluba vivo**
Agneta Lund prenis nin al Maroko la 1.3. En la dezerto ŝia grupo migris helpanta de muloj kiuj portis la manĝaĵon, la kuiran ekipadon, la dormmatracojn ktp. Ili ĝuis la ŝanĝiĝan naturon kaj dumnokte ili dormis sub la libera ŝtelplena ĉielo. Ili ankaŭ havis tempon viziti la grandurbojn Casablanca kaj Marrakech kaj estis tute kontentaj per la vojaĝo



La 29.3 ni decidiĝis por ekzercado de Esperanto pensante pri la alproksimiĝo de la kluba jubileo. Do estis malpermesite ”krokodili”. Ĉiuj ŝajnis kontentaj kaj multe babilis.

Gertrud Lund

## Föreningarnas dag

Det ha inte gått att få fram datum för **Föreningarnas Dag.**
Föregående år ägde den rum den 28 maj.
Troligen blir det däromkring även i år!

**CYKELGRUPPEN**
beslutar själv när den ska åka runt i stan och affischera. Det blir kring månadsskiftet augusti - september.
Kontakta **Per-Olov Johansson**
telefon. 26 31 94 om du kan hjälpa till!

Per-Olov